

Martin Gotthard Schneider,  
Vivojn sep mi volus havi

*tradukita de Adolf Burkhardt*

Vivojn sep mi volus havi.  
Kia beno, kia riĉ'!  
Tio por deziroj ĉiuj  
estus rava plenumiĝ'.  
La unuan mi eluzus,  
sxip-stiristo, kapitan',  
por la vastan mondon vidi,  
veli sur la ocean'.

En la dua vivo min en  
cirko kovrus klaŭna vest',  
kaj admirus ĉiuj min, dre-  
siston de sovaĝa best'.  
En la tria, politike  
estus mi tre grava hom',  
ĉiutage inter Moskvo  
flugus kaj la Blanka Dom'.

Film-stelulo, kanzonisto  
estus mi en vivo kvar;  
ŝikajn aŭtojn, belajn inojn  
mi posedus sen avar'.  
Kaj por helpi la homaron,  
en la kvina vivo mi  
estus kuracisto fama  
en tre alta pozici'.

Sesa vivo: ĉio nuna  
estis nura bagatel'.  
Kosmonaŭto mi fariĝos,  
flugos inter lun' kaj stel'.  
En la sepa vivo - nu, mi  
kio povus esti plu?  
Certe venos la ideo,  
speciala, sen tabu'.

...

Martin Gotthard Schneider,  
Sieben Leben möcht ich haben

Sieben Leben möcht ich haben!  
Ach, das wäre wunderbar,  
denn da würden alle Träume,  
alle meine Wünsche wahr.  
In dem ersten Leben wär ich  
Steuermann und Kapitän  
und ich könnte mir die weite,  
zauberhafte Welt besehn.

Träte auf im nächsten Leben  
dann im Zirkus, bitte sehr,  
und man würde mich bestaunen,  
mal als Clown, mal als Dompteur.  
Und im dritten Leben käm ich  
als Politiker heraus,  
konferierte täglich zwischen  
Moskau und dem Weißen Haus.

Filmstar und auch Schlagersänger,  
dieses reservier ich mir  
(schnelle Autos, schöne Frauen)  
für das Leben Nummer vier.  
Um der Menschheit aufzuhelfen,  
wär im fünften Leben ich  
ein gar hochberühmter Arzt und  
Wunderdoktor sicherlich.

Sechstes Leben: Das Bisher'ge  
scheint mir alles zu gering.  
Weltraumfahrer möcht ich werden.  
Das wär schon ein tolles Ding.  
Und im siebten Leben wär ich -  
ja, was könnt ich da noch sein?  
Ganz gewiß fällt mir bis dahin  
irgendwas Besonderes ein.

...

Vivojn sep mi volus havi.  
 Mi ricevis unu por  
 sole tiun ĉi travivi,  
 antaŭ ol ĝi flugis for.  
 Tiu unu, mia, nun, kun  
 ĝojo, trist', plezuro, dev' -  
 ke ĝi estu bona vivo -  
 jen sincera mia rev'.

*Traduko de la Germana poemo "Sieben Leben möcht ich haben" de MARTIN GOTTHARD SCHNEIDER (\*1930-04-26) en Esperanton de ADOLF BURKHARDT (pastro, \*1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-962-1939 (2014-01-10 18:35:57)*

*Pri la tradukinto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf\\_Burkhardt](http://de.wikipedia.org/wiki/Adolf_Burkhardt).*

Sieben Leben möcht ich haben!  
 Eines ist mir zugeteilt.  
 Und nur eines kann ich leben,  
 ehe es im Nu enteilt.  
 Daß dies eine, meines, hier mit  
 Freude, Kummer, Pflicht und Spaß  
 doch ein gutes Leben würde:  
 Hoffentlich gelingt mir das.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MARTIN GOTTHARD SCHNEIDER (\*1930-04-26).*

*Arg-962-1938 (2014-03-16 15:47:47)*

*Pri la poeto vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Martin\\_Gotthard\\_Schneider](http://de.wikipedia.org/wiki/Martin_Gotthard_Schneider). Vidu ankaŭ:<http://www.hsk-freiburg.de/mgschneider.html>.*

*La poemo kun la esperantigo troviĝas ankaŭ en <http://b-eichkorn.homepage.t-online.de/oekesa34.htm#SiebenLebenmGlychtichhaben>.*